Mesaĝo de la Ĝenerala Sekretario: Monda Tago de Rifuĝintoj 2018

Kion vi farus se vi estus devigata forlasi vian hejmon?

Hodiaŭ, pli ol 68 milionoj da homoj tra la mondo estas rifuĝintoj aŭ enlandaj dislokitoj rezulte de konflikto aŭ persekuto. Tiu estas la ekvivalento de la 20-a plej granda lando en la mondo.

Pasintjare, ĉiun duan sekundon dislokiĝis unu homo. Plejparte en la pli malriĉaj landoj.

Okaze de la Monda Tago de Rifuĝintoj, ni ĉiuj devas pensi pri tio kion ni povas fari por kunhelpi. La respondo troviĝas en unueco kaj solidareco.

Mi profunde maltrankvilas vidante ĉiam pli da situacioj kie rifuĝintoj ne ricevas la protekton kiun ili bezonas kaj al kiu ili rajtas.

Ni staras kune aŭ ni malsukcesas.

Ĉi-jare, la Tutmonda Pakto pri Rifuĝintoj prezentiĝos al la Ĝenerala Asembleo de UN. Ĝi proponas vojon antaŭen kaj rekonas la kontribuojn kiujn rifuĝintoj faras al la gastigantaj socioj.

Dum daŭras militoj kaj persekutado, daŭros produkto de rifuĝintoj. Mi petas, ke vi memoru ilin okaze de la Monda Tago de Rifuĝintoj.

Ilia historio estas historio de obstino, persisto kaj kuraĝo. Nia historio estu historio de solidareco, kompato kaj agado.

António Guterres

Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041